

De la 3-a ĝis la 6-a de novembro 2005 (ĉirkaŭ la freŝbakita festo) en Uljanovsk okazis la 13-a Volgia E-Renkontiĝo (VER). En ĝi partoprenis 74 personoj el 14 loĝlokoj. Plej multis uljanovskanoj (21), la gastoj el Moskvo kaj Moskva regiono (15), Volgograd (15), Ĉeboksari kaj Novoĉeboksarsk (9) kaj Dimitrovgrad (8). El la spertaj esperantistoj estis Irina Gonĉarova (Odincovo), Tatjana Vtorova (Volgograd), Marija Prilepskaja (Samara), Jurij Karcev (Uljanovsk), Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja), Gennadij Basov (Moskvo), geedzoj Irina kaj Maksim Grebeŝĉenko (Uljanovsk), Nina Djomuŝkina (Ŝjasjstroj) kaj ankaŭ la raportanto.

Ĉefan ŝarĝon pri la organizado de VER portis la familio Karcev – Jura, lia edzino Lena, lia patrino Margarita Jurjevna (pri kies energio, agemo kaj bona karaktero ne eblas ne miri). Dum la aranĝo devis esti organizita kuirado por nutri la partoprenantojn, sed lastmomente la profesia kuiristino, kun kiu estis la interkonsento, rifuzis. Tial la preparadon de manĝoj por kelkdek personoj surprenis Lena Karceva; certe por nenio pli ĉe ŝi restis la fortoj kaj tempo. Pro tio Jura devis zorgi pri ĉiuj mastrumaj aferoj (enloĝigo ks.) kaj ankaŭ pri la kunordigo de la programo. Kaj Margarita Jurjevna organizis la ekskursojn kaj helpis al ĉiuj pri ĉio.



kantas la uljanovskanoj

En la programo estis E-kursoj, diskutoj, prelegoj, konkursoj, koncertoj, rolludoj. Ĝuste dum VER-13 okazis lastaj traktadoj pri la unuiĝo de REU kaj REJM, gravis ankaŭ la kunveno pri sekvaj aramasaj aranĝoj. Al ĉiuj tre plaĉis la granda konkurado “Aĝiotado”, organizita de Irina Grebeŝĉenko. Por sukceso partopreni en la konkurado oni devis verki versaĵojn, scii Esperantajn proverbojn kaj kantojn, lerte rampi, salti, blovi, danci, ĵeti ŝuojn ktp. Gajnis Anatolij Krasnokutskij (Volgograd), kiu kolektis plej multajn poentojn pri ĉiuj ĉi konkuroj.

Al mi ŝajnas, ke Jura mem restis iom nekontenta pri la sukceso de la aranĝo. Sed, laŭ mia persona opinio, li faris maksimumon, kion eblis fari en tiuj kondiĉoj kun tiuj partoprenintoj. Kaj pli gravas, ke plejparte kontentaj restis la partoprenintoj mem. Alia utilo sendube estis, ke al la organizantoj de sekvaj regionaj renkontiĝoj (en Uljanovsk, Volgograd, Ĉeboksari, aliaj urboj) tiu ĉi VER certe helpis spertiĝi pri tio, kio devas esti kaj kio ne devas esti en bona mezgranda rusia aranĝo. Kredeble ĝuste nun, dum tiuj ĉi jaroj okazas restarigo de sistemo de diversaj enlandaj E-aranĝoj kaj eltrovado de la plej bonaj modeloj por ilia okazigo.

Garik Kokolija (Moskvo)

LINGVA FESTIVALO EN ĈEBOKSARI

En Ĉeboksari inter la 16-a kaj 23-a de oktobro pasis la 10-a jubilea Lingva Festivalo. Kune kun la antaŭa programo la Festivalo estis vizitita de ĉirkaŭ du mil personoj.

Krom la lanĉita ĉi-jare poezia koncerto en diversaj lingvoj (13) en la Ŝtata Artmuzeo de Ĉeboksari kun 60 partoprenantoj, kiu estis samtempe la solena mafermo de la Festivalo, la programo enhavis 6 karavanojn en diversaj lernejoj de la urbo kaj viziton al Ŝumerlja al la loka Infana Palaco.



la "ronda" tablo

Enkadre de la Festivalo okazis Festivala maratono inter 5 studentaj teamoj, konkurantaj en sportaj naciaj ludoj, arto kaj intelektaj konkursoj.

La ĉefaj tagoj de la Festivalo daŭre restis la semajnfinaĵoj – okazis prezentoj de 39 lingvoj, plej furoris la ĉeĉena, la germana en prezento de esperantisto Jan Schroeder. La prezentoj de Esperanto havis stabile po 10-12 ĉeestantoj.

Sabate okazis ronda tablo "Internacia lingvo de la 21-a jarcento" kun partopreno de Georgij Kokolija, komitatano de UEA, ĉefredaktoro de REGo; Gennadij

Anisimov, vic-katedrestro de la rusa lingvo de la Ĉuvaŝa Ŝtata Pedagogia universitato, doktoro de pedagogiaj sciencoj, membro-korespondento de la Ĉuvaŝa Akademio de sciencoj; Viktorija Urbanaviĉiute, ataŝeo de la litova ambasado en Rusia Federacio. La ronda tablo konkludis, ke la internacia lingvo estas necesa kaj ke ĝi ne devas rompi la rajtojn de la aliaj lingvoj, dum la apliko de Esperanto apenaŭ estos videbla en la proksima tempo. Kvankam la halo hazarde konsistis el poresperantista plimulto.

Furoris la koncerto de JoMo, kiu dancigis centon da homoj el inter 400-450 ĉeestintoj. Sekvatage okazis internacia koncerto kun 24 programeroj.

La Festivalon vizitis la delegitaro de la rus-usona programo "Alfa Fellowship pro-



JoMo ne nur kantis, sed ankaŭ preparis kaj gvidis la konkurson por poliglotoj

gram”, kiu venis sur la ŝtata nivelo; la Festivalon salutis la helpanto de la prezidento de la Ĉuvaŝa Respubliko Dmitrij Krjukov (kiu transdonis salutvortojn de la prezidento). La usonanoj estis tre kontentaj veni al la Festivalo, ĉar ĝi estis unu el la malmultaj viglaj partoj de ilia vizito.

El esperantistoj krom menciitaj personoj venis Irina Gonĉarova kun grupeto da studentoj, Steve Kobb, usonano, laboranta en Moskvo; 33 uljanovskanoj, gvidataj de la familio Karcev (Jura, la patrino Margarita Jurjevna kaj la filino Maŝa), niĵnij-novgorodanoj kun Aleksej Kozlov.

Pluraj amaskomunikiloj favore raportis pri la Festivalo.

Aleksandr Blinov (Ĉeboksari)



la organizantoj pridiskutas la rezultojn de la deka LF

ZAMENHOFA SEMAJNFINO EN KALININGRADO

70 esperantistoj el Germanio, Litovio, Pollando kaj Kaliningrado kunvenis la 2-an de decembro, vendrede, en la Ĝenerala Konsulejo de Pola Respubliko en Kaliningrado okaze de la kvina Zamenhofa Semajnfino. Jarosław Czubiński, la Ĝenerala Konsulo de Pollando, tradicie malfermis la Semajnfino. Ĉi-foje la konsulejan kunvenon unuafoje partoprenis oficiala diplomata reprezentanto de lando alia ol Pollando – Arvydas Juozaitis, kultura ataŝeo de Litovio en Kaliningrado. La regionan administracion, same kiel en la pasinta jaro, reprezentis Ljudmila Kovtun el la Kleriga Ministerio de Kaliningrada regiono. Ŝi koncize prezentis la historion de Esperanto kaj la rolon, kiun ĉi tiu lingvo devus ricevi nuntempe. (Ŝi eĉ promesis eklerni Esperanton.) Viktor Ŝapiro, gvidanto de la kaliningrada juda ko-



la malfermo: Aleksander Korĵenkov, Jarosław Czubiński, Halina Gorecka (foto de O.Ŝipovalenko)

munumo, estas ĉiama gasto en la Zamenhofaj Semajnfinoj. Kiel kutime, lia sprita kaj neformala alparolo malstreĉis la esperantistajn partoprenantojn, kiuj ne senescepte konas la diplomatan protokolon.

Post muzika paŭzo, dum kiu Natalja Strijnjova bele kantis en Esperanto, sekvis paroladetoj de la estroj de la landaj delegacioj. Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio, Povilas Jegorovas, laŭmerite parolis la unua – ja ĉi-jare Litovio estis la metropolo de Esperantujo. Li tute prave ne parolis pri la 90-a Universala Kongreso, ĉar ĉiuj ĉeestantaj esperantistoj partoprenis ĝin aŭ multe legis pri ĝi. Jegorovas uzis sian tempon por rakonti pri la 4-a Nitobe-Simpozio, pri la senprecedenca eldonado kaj pri la neceso reteni la altan nivelon kaj bonan reputacion, kiujn la esperantista movado atingis en Litovio danke al la Kongreso. Edward Kozyra, vicprezidanto de Pola Esperanto-Asocio, koncize prezentis la situacion de Esperanto en la naskiĝlando de Esperanto. Halina Gorecka, prezidanto de Kaliningrada Regiona Esperantista Unuiĝo parolis plej malmulte: unue ĉar ŝi ja prezidis la kunvenon, due



*pollandaj artistoj el “Kujawy” kaj “Hitano”
(foto de O.Šipovalenko)*

ĉar KREU estas tute malgranda asocio kompare kun tiuj de la najbaraj landoj, kaj trie ĉar raporto pri la lastjara esperantista aktivado en Kaliningrado estis anticipe disdonita. La plej longan paroladon faris Felix Zesch, gvidanto de Germana Esperanto-Junularo, verŝajne la plej aktiva junulara esperantista organizo. Li skizis la ĉefajn direktojn de GEJ kaj prezentis ankaŭ la agadon de la Germana E-Asocio.

En la dua muzika paŭzo kelkajn specimenojn el siaj sekvont-tagaj koncertoj prezentis du polaj artaj kolektivoj: folkloro ensemblo “Kujawy” el Włocławek kaj romaa ensemblo “Hitano” el Olsztyn. La partoprenantoj estis regalitaj per trinkaĵoj kaj dolĉaĵoj, havis iom da tempo por interbabili kaj respondi demandojn de ĵurnalistoj.

La sabata programo antaŭtagmeze havis ekskurson tra la urbo, kiun pretigis kaj gvidis Nikolaj Penĉukov. Posttagmeze en la urba Marista Kulturpalaco la programon daŭrigis koncerto. Mallaŭ la pesimisma takso de la organizantoj, ĝin spektis ne nur esperantistoj – male, ili estis sufiĉe malmultaj, ĉar preskaŭ 200 personoj aĉetis biletojn kaj ĝuis la prezentojn de “Kujawy” kaj de “Hitano”, kiun helpis per kantado en Esperanto junulina kantogrupo el Pelplin.

Ĉi-jare en Esperantujo oni diversmaniere festas la centjariĝon de la Universalaj Kongresoj. Ĉi tial la temo de la festprelego de Aleksander Korĵenkov estis Zamen-

hof kaj Bulonjo. Sekvis samtempe seminario pri kunlaboro de baltlandaj esperantistoj, en kiu krom la jam nomitaj delegaciestroj partoprenis kelkaj regionaj aktivuloj, kaj konversacia rondo, kiun gvidis Irmina Szustak kaj Irek Bobrzak el la “Varsovia Vento”.

La sabatan programon kompletigis la Zamenhofs Bankedo, ĉi-foje en la restoracio “Nart”. Ĝi finiĝis postnoktomeze.

La dimanĉa programo estis turisma – Alen Kris, kolumnisto de “La Ondo de Esperanto”, gvidis ekskurson tra la banurbo Svetlogorsk.

Grava estis ne nur la planita programo, sed ankaŭ multaj neformalaj kontaktoj kun diplomatoj kaj inter la esperantistoj. Same kiel dum ĉiuj Kaliningradaj esperantistaj renkontiĝoj, regis internacia etoso, ja nur 20% da partoprenantoj (14 el 70) estis ruslandanoj.

(esperanto-rus-informoj)

NEFORGESEBLA VOJAĜO AL JAPANIO

Raja Kudrjavceva: Antaŭnelonge ni revenis el mirinda kaj ĝuinda vojaĝo al Japanio, kien ni estis invititaj partopreni la 92-an Japanan Esperanto-Kongreson en la urbo Jokohamo. Ĝis nun aperas antaŭ la okuloj bildoj de travivitaj dumkongresaj momentoj kaj de vizititaj belegaj lokoj, en la kapoj svarmas ekzotikaj japanaj nomoj kaj apartaj vortoj – ja tiom da neforgeseblaj impresoj restis kun ni! Nin impresis multo: kaj la kongreso mem, tre zorge preparita kaj altnivele okazigita; kaj la bela havenurbo Jokohamo, kiu gastigis tiun ĉi aranĝon kaj ankaŭ akceptos la partoprenontojn de la 92-a UK en 2007; kaj la postkongresa kultura programo kun vizitoj al multaj vidindaĵoj.

Viktor Kudrjavcev: Unue mi rakontu pri la kongreso, dum kiu ni havis unikan ŝancon komunikiĝi kaj amikiĝi kun multaj japanaj esperantistoj, vidi kia estas la japana Esperanto-movado, aŭdi kiel japanoj parolas Esperante. La kongreso okazis dum tri tagoj, la 21-23-an de oktobro, kun partopreno de 370 esperantistoj. Sed aliĝintaj kaj pagintaj la kongreskotizon estis 550. Laŭ bona tradicio de japanaj esperantistoj, eĉ ne povante pro diversaj kialoj ĉeesti la kongreson, ili tiel subtenas la landan Esperanto-movadon.

Unue nin impresis elektita de la organizantoj tre bela kaj taŭga kongresejo – impona renesancstila palaco



en centro de la urbo kun granda kongreshalo, vasta salono por libroservo, aparta ekspoziciejo, kun prelegejoj kaj pluraj ĉambroj por fakkunvenoj. Belegaj vitraloj kaj olepentraĵoj interne de la kongresejo



plezurigis niajn rigardojn. La konstruaĵo estas registrita kiel unu el gravaj historiaj monumentoj de Japanio. Ĉi tie okazis la Japanaj E-Kongresoj jam kvarfoje: en 1980, 1985, 1990, 2005.

Alia bona impresoj estis la plej vizitata eksponejo, nome la libroservo. Eniri tiun trezorejon kaj vidi tiom da titoloj – ĝojigis nin! Ni vidis, kia granda prepara laboro estis farita de jokohamaj samideanoj: speciale eldonitaj Kongreslibro, riĉe ilustrita “Gvidlibro pri Jokohamo”, mapo de la urbo ktp kaj aranĝitaj interesaj ekspozicioj pri la historio kaj nuntempo de la landa E-movado.

Ĉio estis bone pripensita: loĝado (en proksime situantaj komfortaj hoteloj), manĝado (matenmanĝoj en hoteloj kaj antaŭviditaj lunĉoj por ĉiuj dum la taga manĝpaŭzo), ekskursoj, kiujn gvidis Esperanto-ĉiĉeronoj, kaj la programo. Certe, atente prizorgitaj praktikaj flankoj ankaŭ sukcesigis la kongreson.

La programo de la kongreso estis varie planita, tiel, ke ĝi efike uzis la kongrestempon por konatigi kaj proksimigi, informi kaj klerigi, instigi kaj entuziasmigi la partoprenantojn. Dum la Solena malfermo la kongresanojn salutis vicurbestro de Jokohamo. Poste sekvis salutparoloj de la movadgvidantoj kaj de eksterlandaj esperantistoj; okazis sufiĉe lakone prezentita raporto pri E-movado en Japanio far la estro de organiza fako de Japana Esperanto-Instituto. Ankaŭ estis anoncitaj premiitoj de speciala premio “Osaka” pro aktiva E-agado kaj granda kontribuo al la evoluo de Esperanto (la premion ricevis s-ro Yamasaki Seiko) kaj de belarta konkurso (s-ino Aida Yayoi). Ĉarme elpaŝis koruso de lernejoj, kiuj kantis kelkajn kantojn Esperante kaj fine ĉiuj partoprenintoj kunkantis “La Esperon”.

Aparte kortuŝitaj ni estis pro unuminuta silenta preĝo omaĝe al la forpasintaj dum la jaro japanaj esperantistoj. Iom deflankigante ĉi tie de la rakonto pri la kongreso, mi devas rimarki, ke danke kaj estime memori pri ĉiuj, kiuj lasis bonan spuron en la japana E-movado, kaj ĝenerale atente rilati al la historio – estas unu el impresaj ecoj de japana esperantistaro. Dum la sekvaj kongrestagoj ni povis vidi, kiel japanaj esperantistoj gardas memoron pri Alphonse Mistler, kiu la unua enkondukis Esperanton en Japanion. Dum la pieda ekskurso tra la urbo okazis speciala vizito al lia tombo ĉe la tombejo por alilandanoj. Same multloke, en diversaj urbaj muzeoj, ni povis vidi librojn kaj fotojn de Vasilij Eroŝenko kaj ofte aŭdi bon-

vortojn pri li.

Sed mi revenu al la kongreso. Sub la temo “Rekonu, Esperanto nun!” la kongreso okupiĝis pri diversaj movadaj, lingvaj, klerigaj demandoj; okazis multaj prelegoj, oficialaj kunsidoj, fakaj kunvenoj, konversaciaj rondoj, ekzamenoj ktp. Estis ankaŭ programeroj, kiuj celis evoluon de novuloj. Ni mem gvidis konversaciajn rondojn por komencantoj kaj devas diri, ke paroligi la alilingvanojn estas aparte interesa sperto.

Ni eksciis, ke jokohamaj esperantistoj atente flegas kontaktojn kun ĝemelaj urboj de Jokohamo. Krom nia duopo kaj unu samideano el Mongolio, ili invitis ankoraŭ tri eksterlandajn esperantistojn, kiuj reprezentis tiujn urbojn: Ŝanhajo (Ĉinio), Odeso (Ukrainio) kaj Konstanco (Rumanio). Ĉiuj eksterlandanoj faris interesajn prelegojn. En nia prelego pri la temo “Estonteco komenciĝas hodiaŭ. Ni laboru kaj esperu” ni, laŭ propono de la invitintoj, rakontis pri nia poresperanta agado kaj nia revuo “Komencanto”.

Dum la kongreso okazis ankaŭ kunsido de Landa Kongresa Komitato, dediĉita al preparado de UK-92 en Jokohamo en 2007. Konstateblis, ke jam nun japanaj esperantistoj aktive preparas sin al la estonta evento. Oni organizis por ni ŝipekskurson kun vizito al la estonta kongresejo de UK-92 en Jokohamo. Ni povis vidi la belaspektan konstruaĵon en formo de velo kaj konkoj, kiuj estas unikaj simboloj de Pacifiko-Jokohamo. Tiu ĉi konstruaĵo estas unu el la plej grandaj kongresejoj en la mondo.

Krom laboraj momentoj dum la kongreso estis ankaŭ la distraĵ: dum la unua vespero okazis amika koncerto, dum kiu tipe japanaj programeroj, kiel kimonovestigito en danca formo kaj japanaj kantoj Esperante prezentitaj, alternis kun elpaŝoj de eksterlandaj gastoj, sonis ĉinaj kaj mongolaj kantoj en Esperanto, sekvis gaja ukraina popola danco ktp.

La duan vesperon okupis bankedo en granda ĉina restoracio kun senĉesa vico de ekzotikaj pladoj; agrabla nebrua muziko, plenumata per nekonataj muzikiloj, inklinis al leĝera interhoma komunikado. Tie, ĝuante senĝenan etoson kaj harmoniplenan kunes-

tadon, ni simple forgesis, ke ni estas en fremda por ni lando kaj sentis sin inter amikoj.

La kongreso fakte diversmaniere imitis UK-ojn. Sed ĝi havis ankaŭ specifajn trajtojn. Ekzemple, dum ĝi, diference de niaj REU-kongresoj, ne okazis longdaŭra raport-reelekta parto, ĉiuj balotoj estis faritaj



perrete kaj koresponde jam antaŭ la kongreso kaj en tio partoprenis ĉiuj membroj de la landa organizaĵo. Krome, ni al kutimiĝintaj jam al komuna kantado gitarakompane dum niaj E-aranĝoj, sentis mankon de ĝi, ĉar por ni la komuna kantado ja estas ankaŭ parto de interkomunikado.

Al mi plaĉis, ke dum la solena fermo oni jam kurte raportis pri farito dum la tri tagoj, pri elspezitaj por tio monrimedoj kaj ĝenerale oni faris resumojn de la okazigitaj aferoj. Plej escepta tamen estis, ke okazis jam prezento de Esperantogrupo el urbo de sekvontjara japana E-kongreso. Esperantistoj el Okayama elpaŝis kun invitparolo kaj plenumis kelkajn kantojn. Krome, inter la kongresdokumentoj jam estis eldonita prospekto pri ilia urbo. Fine okazis simbola transdono de la kongresa standardo, simile al UK-tradicio.

Post la fino de la kongreso ĉio tre rapide, dum malpli ol unu horo, estis kune



ordigita, ĉiuj ekspozicioj malmuntitaj, multego da libroj pakita ktp, kaj la granda teamo, ĉi-foje nur la organizantoj, gaje iris por festi la sukceson de la aranĝo en japanan restoracion. Ankaŭ ni estis invititaj...

Raja Kudrjavceva: La kongreso estis, certe, estiminda ekzemplo. Antaŭ kelkaj monatoj ni mem kunorganizis ĉi-jaran REK-on en nia urbo Jekaterinburg, tial ni kun granda intereso partoprenis tiun ĉi kongreson kaj atentis multajn ĝiajn flankojn. Ne sen bona envio ni konstatis, ke eblas kunveni tiom da homoj, okazigi ĉion en tiom plaĉaj kaj oportunaj kondiĉoj kaj fari tiel, ke ĉio funkciis glate, kiel bona japana horloĝo. Ni gratulis japanajn esperantistojn pro la profesia organizado de la aranĝo kaj vere sukcesa, kreiva kongreso. Mi multe pensis, kio ebligis tiun okulfrapan sukceson de la aranĝo? Kaj mi

opinias, ke ĉio sukcesis dank' al organiza unueco, kapablo kunagadi kaj granda entuziasmo de la japana esperantistaro. Kaj ankoraŭ dank' al disciplinemo kaj granda respondeco de ĉiuj – ni povis vidi ke estis taskigitaj ĉiuj aktivuloj kaj ĉiu tre respondece plenumis sian taskon. Bona, sekvinda ekzemplo!

La dumkongresaj impresoj estas nur unu parto de niaj impresoj entute. Alia granda parto estas ligita kun la dumsemajna postkongresa restado en Japanio, dum kiu ni povis plene ĝui varmecon de internacia amikeco kaj gastis en hejmoj de joko-hamaj esperantistoj, kie ni plezure spertis japaneskan vivmanieron. Al ni plaĉis japanaj dometoj, kutime ne tre grandaj kaj duetaĝaj, kun malgrandaj japanstilaj ĝardenoj, ofte kun facile moveblaj muroj ene kaj ne tro ŝarĝitaj per mebloj pro bonaj dorm- kaj sid-kutimoj. Ĉio estis nekutime interesa por ni: dormi sur tatamo, manĝi

per bastonetoj, ktp. La manĝkutimoj ankaŭ plaĉis al mi, ĉar la japanoj manĝas multe da fiŝoj, marproduktoj, algoj, legomoj – tre utilaj por la homo. Rizo valoras kiel pano. Salon anstataŭas soj-saŭco. Nun preskaŭ ĉie en la mondo estas japanaj restoracioj, sed nur en Japanio ni povis ĝui verajn japanajn bongustaĵojn: “sasumi”, “susi”, “miso”-supon ktp.

Kompreneble, ĉi tie eblas ankaŭ aprezi la te-ceremonion. Por ni speciale estis organizita vizito al tre bela japanstila ĝardeno “Sankeien”, kie troviĝas la Domo de te-ceremonio, konstruita en la deksepa jarcento. Ĝenerale por fari la tutan klasikan ceremonion oni bezonas kvarhoran tempon, dum kiu oni ĝuas malstreĉan kaj komfortan etoson de te-kuirarto kaj interkominikado. La ĝardeno mem estas ege bela loko, kie regas trankvilo kaj kvieto kaj tempo kvazaŭ haltas. Nekompareblaj naturaj pejzaĝoj inkludas al poezio, tial ĉi tie ofte okazas kunvenoj de hajkoŝatantoj. Ni havis plezuron ankaŭ ĉeesti tiun kunvenon, aŭdi hajkojn de la japanaj verkistoj kaj eĉ elpaŝi kun propraj hajko-provoj (tiu programero estis antaŭplanita kaj ni povis prepariĝi). Fine de la vespero oni donacis al ni por la memoro belajn orkolorajn ventumilojn kun surskribitaj per hieroglifoj tekstoj de niaj hajkoj.

Kun plezuro ni povis vidi, ke en la moderna kaj rapide progresanta



Japanio tamen estas tio, kio restas sama, kiel antaŭ centoj da jaroj – tio estas la nacia kulturo kaj la zorge konservataj popolaj tradicioj. Tio estas belegaj malnovaj temploj, kiuj ankaŭ montras antikvan ĉarmecon de Japanlando. Min tre impresis speciale organizita tuttaga ekskurso al urbo Kamakura, iama antikva ĉefurbo de Japanio. Kamakura famas pro siaj belegaj temploj kaj estas perlo de malnovstila japana arkitekturo kun harmonia kombino de diversgrandaj pagodoj kun tegolaj tegmentoj, fleksitaj al ĉielo ĉe anguloj, de diversformaj pordegoj kaj multaj transiroj. Ĉiujn tiujn grandiozajn kaj majestajn templojn ne eblas priskribi kaj voki per tio la samajn sentojn, kiujn ili vokas en realo, necesas simple vidi tion. En la korto de unu el sanktejoj altiĝas granda bronza statuo de Budho. Ĝi estis iam origine lokita en la interno de la templo, sed la templo detruigis pro granda cunamo, postlasinte nur la grandegan Budhon, kiu impresas forte kaj neordinare.

Ni vizitis ankaŭ interesegan, historiplenan urbeton Odavara. La plej rimarkinda loko ĉi tie estas Palaco-fortikaĵo, loko, kiu memoras kiel ĉi tie loĝis kelkaj dinastioj

de japanaj kavaliroj – samuraoj. Nun ĉi tie estas muzeo kun multaj eksponaĵoj de tiu tempo. Oni povas eĉ surkapigi unu el mirindaĵoj de la ekspozicio – kapvestaĵon de samuraoj, kaj tio plene translokigas onin en tiun malproksiman epokon.

Sed el ĉiuj mirindaĵoj plej elstaras naturaj belaĵoj. Admirindaj japanaj ĝardenoj kaj parkoj kun lagoj kaj riveretoj, kun aĵuraj fontetoj, kun simpatiaj laŭboj, pavilonoj kaj terasoj, estas tre allogaj lokoj. Oni povas dum horoj vagi ĉi tie, kunfandiĝante anime kun la naturo. Kaj ĝuste ĉi tie oni trasentas kaj komprenas la spiriton de tiu ĉi lando, kiu estas unuiĝo de antikveco, naturo kaj vere modernaj teknologioj. Mi pensis ankaŭ, ke verŝajne japanoj povas trovi tiun bezonatan ekvilibron inter la moderna vivo kun ĉiuj komfortebloj kaj samtempe tre streĉa kaj stresa por homo, kaj vivo malrapida, kontempla, en unueco kun naturo – eble en tio kuŝas unu el sekretoj de plej longa averaĝa vivodaŭro de la japanoj. Mi povus ankoraŭ multon rakonti pri pluiraj vizititaj lokoj kaj vidindajhoj kiel historia muzeo Edo-Tokio, muzeo de originala luktarto sumoo ktp, sed mi tamen devas halti ĉi tie, ĉar nia rakonto jam iĝis sufiĉe longa kaj multseria.

Viktor Kudrjavcev: Nur kelkajn vortojn mi volus aldoni pri Japana Esperanto-Domo, kiun ni vizitis en Tokio. Ĝi estas kvinetaĝa (!) konstruaĵo, sidejo de Japana Esperanto-Instituto kaj enhavas: oficejon kun komputiloj kaj oficaparataro, libroservon, salonojn por kunsidoj kaj kursoj, bibliotekon, arkivon kun multaj raraj libroj kaj revuoj. (Kaj tiu kvinetaĝa konstruaĵo estas propraĵo de Japana E-Instituto!) Estis tre agrable vidi sur la breto de periodaĵoj ankaŭ “Komencanton”, zorge binditan ekde la unua numero de 1998. La direktoro de JED s-ro Isino Yosio afable konatigis nin kun la strukturo de la Domo, regalis per teo kaj petis skribi kelkajn vortojn en la libron de eksterlandaj gastoj.

Sed la plej elstara nia impresoj restas la grandanimeco kaj gastameco de japanaj esperantistoj, kiuj tre varme akceptis nin, afable gastigis, akompanis, konatigis nin kun sia lando kaj kulturo! Ni povas nur fini per la vortoj: ne preterlasu la bonan okazon viziti tiu ĉi mirindan landon, nepre partoprenu en la 92-a Universala Kongreso en Jokohamo en 2007 kaj ĉion vidu propraokule!

Raja kaj Viktor Kudrjavcev (Jekaterinburg)



Profesoro de la Ĝeneva Universitato kaj specialisto pri lingvoekonomiko François Grin publikigis ampleksan dosieron kun analizo de la lingvopolitiko de Eŭropa Unio. La studon eldonis la Alta Konsilio pri Taksado de la Lernejo, franca publika organizaĵo aŭtonoma. La dosieron eblas elŝuti ĉe la adreso <http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport_Grin.pdf>.

La informo starigas la demandon, kiu estus la optimuma elekto pri la laborlingvoj en Eŭropa Unio. Por tion fari, ĝi studas la nunan situacion kaj konkludas, ke la enspezoj, kiujn Britio ricevas de la superregado de la angla en la mondo, kaj ankaŭ en Eŭropa Unio, estas po 17-18 miliardoj da eŭroj jare, t.e. 1% de ĝia malneta nacia produkto. Tiun kvanton ĝi ricevas el la vendado de libroj kaj aliaj varoj ligitaj al la angla lingvo kaj el la 700 000 homoj ĉiujare vizitantaj Anglion por lerni la lingvon, krome ankaŭ el la ŝparoj devenantaj de la neglektado de la fremdlingva instruado en la britaj lernejoj. Ne temas pri la tuto de la ekonomiaj transpagoj al la Unuiĝinta Reĝlando pro lingvaj kaŭzoj, sed pri 75 % el ili, kion la aŭtoro taksas kiel frukton de la hegemonio de la angla kaj ne nur de la demografia pezo de la lingvo mem. El tio rezultas, ke ĉiu el el 280 milionoj da ne-anglalingvanoj de la Unio jare subvencias per 65 eŭroj la britan ekonomion.

Kvankam tiuj nombroj estis publikaj inter specialistoj, mankis analizo, ĉu tiuj kostoj estus pli malaltaj, se oni elektus aliajn solvojn, kiel tiujn, kiujn la laboraĵo formulas. Per la plilarĝigo de la Komunumo al 25 landoj en la pasinta jaro, la oficialaj lingvoj leviĝis de 11 al 20, kaj fariĝis 21 per la ĵusa akcepto de la irlandia. Tio starigas dubojn pri la egaleca politiko inter la ŝtataj lingvoj de Eŭropa Unio, establita en la tempo de ĝia fondo, kiam ili estis nur kvar, kaj pensigas pri sistemo kun unu aŭ kun malgranda grupo de laborlingvoj, kiu iom post iom ŝajne sin trudas.

La svisa ekonomikisto proponas komparon inter tri eblaj scenaroj: la angla kiel sola lingvo, trilingveco angla-germana-franca kaj la elekto de Esperanto kiel interna laborlingvo en la uniaj organoj. La unua scenaro pligrandigus la ekonomiajn transpagojn al la anglosaksaj landoj. Male, la studaĵo konkludas, ke la trilingva scenaro havas koston similan al la unua, sed kun pli granda egaleco. Tamen ĝi konsideras, ke tia solvo lamas pro “ioma malstabileco” kaj postulas konsiderindan kvanton da rimedoj por efektiviĝi ĝin. La tria scenaro, Esperanto kiel sola interna laborlingvo, aperas, kun granda diferenco, kiel la plej malmultekosta kaj egaleca. La ŝparojn oni sukcesus per du vojoj. Unuflanke, la simpleco de Esperanto permesus malpli investi en la instruadon de fremdaj lingvoj – kvankam la studo antaŭvidas la lernadon de dua fremda lingvo en la lernejoj de ĉiuj membroŝtatoj, kaj, de alia flanko, ĉar ĝi estas nenies lingvo, la varojn kaj servojn ligitajn al ĝia instruado oni povus egale produkti en ĉiuj landoj, kio kreus valoron en ĉiuj.

Profesoro Grin mallonge analizas ankaŭ la realigeblon de ĉi tiu tria scenaro, kiun li konsideras “neefektivegebla en mallonga tempo”, sed ebla en la daŭro de unu generacio. “85% de la loĝantaro de la 25 eŭropaj ŝtatoj havas pri tio rektan kaj evidentan intereson, sendepende de la kulturaj kaj politikaj riskoj kuntrenataj de la lingva hegemonio”, li asertas.

Hector Alos i Font, Kataluna Esperanto-Asocio

Bulteno de REU

REU KAJ REJM UNUIGIS LA MEMBRAROJN

La komitato de Rusia Esperantista Junulara Movado kaj la Estraro de Rusia Esperantista Unio interkonsentis ekde la novembro 2005 unuigi siajn membrarojn. Ĉiuj ĉi-jaraj membroj de REJM, kiuj ne estas samtempe REU-membroj, ricevos la membrokartojn de REU por 2005. Kaj ekde la 1-a de januaro de 2006 ĉiuj membroj de REU, kiuj aĝas malpli ol 31 jarojn, estos aŭtomate konsiderataj membroj de REJM. Por efektiviĝi tion, REJM jure iĝos junulara sekcio de REU, laŭ la sama modelo kiel TEJO estas junulara sekcio de UEA. Sed praktike REJM restas memstara organizo, kun propra statuto kaj apartaj financoj. Ĝian komitaton elektos nur la membroj de REJM, kaj tiu komitato portos la plenan respondecon pri la agado de la organizo. La REU-Estraro garantiis plenan respekton al tiu memstareco. La Estraro de REU alvokas al ĉiuj siaj membroj helpi reaktivigi Rusian Esperantistan Junularan Movadon.

La Estraro de REU kaj la komitato de REJM

MALFERMA TAGO OMAĜIS OFICEJAN JUBILEON

La Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 26-an de novembro omaĝis la 50-an datrevenon de la translokiĝo de la sidejo de UEA al Roterdamo. Ekde novembro 1955 CO troviĝas en la nederlanda metropolo, kies animon “ornamas filozofia saĝo, aŭdaca praktikemo kaj senfina kuraĝo”, kiel Ivo Lapenna skribis en la revuo “Esperanto” anoncanta la ekfunkcion de la asocia centro en la nova loko. Malgraŭ la malfavoraj veteraj kondiĉoj la Malferma Tago havis cent vizitantojn el 12 landoj.

Kun la unua, Ĝeneva, epoko de la sidejo la publiko konatiĝis per la prelego de historiisto Ziko Sikosek pri la tiama direktoro Hans Jakob. Poste Johano Rapley, la lasta gvidanto de la oficejo en la apud-Londona vilaĝo Heronsgate, prilumis tiun mezan periodon de la CO. En formo de intervjuo, kiun gvidis Sikosek, prezentis siajn rememorojn Glauco Pompilio, iama KKS, kiu komencis sian oficistan servon en la unua, luita domo de UEA en Roterdamo, kaj Victor Sadler, kiu laboris en la nuna domo du jardekojn kiel redaktoro, oficeja direktoro kaj ĝenerala direktoro.

La ĉefgasto estis la Prezidanto de UEA, Renato Corsetti, kiu vigle diskutis kun aŭskultantoj pri la taskoj kaj defioj, kiujn aktuale frontas UEA. Novaĵo en la programo estis la ludo-tago de Nederlanda Esperanto-Junularo, kiu ebligis pasigi tempon per diversaj tabloludoj. La tago estis sukcesa por la Libroservo de UEA, kiu vendis librojn kaj aliajn varojn por 2522 eŭroj. Denove la plej furora verko estis “Vojaĝo en Esperanto-lando” de Boris Kolker, kiun akiris 10 vizitantoj. Ĝin sekvis, kun po 9 ekzempleroj, la plej novaj eldonaĵoj de UEA, lanĉitaj en tiu ĉi Malferma Tago: “Etimologia vortaro de la propraj nomoj” de Andre Cherpillod kaj “Lumo, mallumo kaj kelkaj memoroj”, libreto kun la prelego de Marjorie Boulton

en la Malferma Tago en novembro 2004. En 6 ekz. vendiĝis la utopia novelo “Klaŭstralia” de Istvan Bejczy, kies tradukinto Istvan Ertl mem prezentis la libron. De “Taglibro de mia frato” (C.Pressburger), “Historio de Esperanto” (A.Korĵenkov) kaj “La unufoja lando” (T.Venclova) estis venditaj po 5 ekz.

Dum la tuta Malferma Tago laboris kun siaj kameraoj Petro Balaz kaj Francisco Veuthey, kiuj registris scenojn de la tago por dokumenta filmo. La filmo prezentos ankaŭ la vivon de la Centra Oficejo. Oni antaŭvidas lanĉi ĝin en aprilo.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA, № 219)

UEA KAJ ILEI REPREZENTIĜIS EN LA ĜENERALA KONFERENCO DE UNESKO

La akcepto de tri gravaj norm-donaj dokumentoj kaj la reelektado de Koïchiro Matsuura kiel Ĝenerala Direktoro markis la 33-an Ĝeneralan Konferencon de Unesko, kiu kunvenis en Parizo de la 3-a ĝis la 21-a de oktobro. Por la Esperantomovado la plej interesa el la akceptitaj dokumentoj estas la Konvencio pri la Protektado kaj Antaŭenigo de la Diverseco de Kulturaj Esprimoj, en kiu Unesko denove rememorigas pri la lingva diverseco kiel fundamenta elemento de kultura diverseco. La du aliaj novaj dokumentoj estas la Internacia Konvencio kontraŭ Drogoj en Sporto kaj la Universala Deklaro pri Bioetiko kaj Homaj Rajtoj. En la programo de la Konferenco estis ankaŭ festo por omaĝi la 60-jariĝon de Unesko.

UEA kaj ILEI, kiuj estas en operaciaj rilatoj kun Unesko, estis invititaj al la Konferenco kiel observantoj. Reprezentiĝis entute 57 el ĉ. 350 neregistaraj organizaĵoj kun operacia statuso ĉe Unesko. Kiel delegitoj de UEA ĉeestis Renee Triolle kaj Barbara Despiney, dum Jean-Pierre Boulet, Monique Arnaud kaj Francois Lo Jacomo reprezentis ILEI. La esperantistaj delegitoj partoprenis ankaŭ en la ekspozicio pri la Unesko-programo “Edukado por ĉiuj”. Same kiel kelkdeko da landaj kaj NRO-aj delegitoj, R.Triolle nome de UEA kaj F.Lo Jacomo nome de ILEI prezentis en du-minutaj filmetoj, kiel la du Esperanto-organizaĵoj kontribuas al tiu ĉefa programo de Unesko. La filmoj estis senĉese montrataj en la halo de la Unesko-domo, kie okazis la ekspozicio.

(Gazetaraj komunikoj de UEA, № 218)

NOVA MEMBROKARTO DE UEA ENKONDUKITA

La Centra Oficejo de UEA komencis liveri al la novaj membroj de la Asocio novstilan membrokarton. Temas pri kreditkartformata, plastumita kaj kolora karto, kies dezajno estas inspirita de la interreta hejmpaĝo de UEA. La unuan ekzempleron de la karto Ĝenerala direktoro Osmo Buller transdonis al la Prezidanto Renato Corsetti dum sia laborvizito al Florenco la 18-an de novembro. Krom la novaj membroj de UEA, la novstilan karton ricevos inter la unuaj ankaŭ la komitatanoj de UEA kaj TEJO kaj la membroj de Societo Zamenhof.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA, № 219)

Demando.

“Ĉu donas al ni membriĝo en REU iun rabaton por partopreni UK-on?” (Vladi-

mir Sudakov, Primorskij reg.)

Respondo.

Membroj de REU aŭtomate iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio, ĉar REU pagas kontraŭ siaj membroj koncernan kotizon al UEA. Tion konfirmas membromarkoj de UEA, kiun ricevas ĉiu REU-ano. Krom morala stimulo, kiu permesas senti sin reala partoprenanto de la plej granda internacia esperantista organizo en la mondo, la aligitaj membroj rajtas plene uzi informan kaj konsultan servon de Delegita Reto de UEA, de Centra Oficejo kaj aliaj instancoj de UEA. Ili tamen ne partoprenas en balotado por elekto de la Komitato, ne havas rajton je rabatoj dum Universalaj Kongresoj. Por tio ĉi necesas esti Individua Membro de UEA, paginte koncernan kotizon al Peranto de UEA. Por 2006 individua kotizo en la kategorio "Membro kun Jarlibro" estas 11 eŭroj, en la kategorio "Membro-Abonanto" (kun la revuo "Esperanto") – 28 eŭroj.

Mikaelo Ĉertilov, Peranto de UEA en Rusio

p/k 21, 143006 Moskva-Odincovo-6; tel. +7-916-2019437

retadreso <mikaelo@km.ru>; ICQ#70039518

NOVAJ REU-ALIĜOJ POR 2005

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Andrejsons Sergej (Sankt-Peterburg), Burkina Oksana (Sankt-Peterburg), Dronova Viktorija (Volgograd), Grankina Nadejda (Soĉi), Grankina Polina (Soĉi), Grigorenko Jekaterina (Volgograd), Ĥlizov Konstantin (Krasnojarsk-Irkutsk), Ivanov Vjaĉeslav (Sankt-Peterburg), Kadar Aleks (Francio), Kapitonova Jekaterina (Ĉeboksari), Karamalikova Nadejda (Ĉeboksari), Kikavec Jaroslav (Tverj), Koltunov Valerij (Sankt-Peterburg), Kozlov Aleksej (Niĵnij Novgorod), Krasnokutskij Anatolij (Volgograd), Maciboruk Anna (Krasnojarsk), Maslova Jelena (Dimitrovgrad), Penjkov Andrej (Moskvo), Sidorova Valentina (Francio), Tonkova Eleonora (Moskvo), Viĥrov Konstantin (Ĉeboksari)

NOVAJ REU-ALIĜOJ POR 2006

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

Moskva EK MASI (11 membroj): *Elit Ivan, Gonĉarova Irina, Gergešan Roman, Grustnev Kirill, Ljubušina Jekaterina, Mitrakova Marija, Nikonov Dmitrij, Penjkov Andrej, Penjkova Julija, Volkova Jekaterina, Zarubina Julja*

Tiĥvina EK (12 aligitaj membroj): *Baraškov Vasilij, Belova Tatjana, Bistrova Margarita, Denisova O., Kaĉalova Zoja, Kirjakov Anton, Koroteckij Aleksandr, Kurma A., Rajskaĵa Natalja, Tiĥomirova Olĵa, Vlasova Vera, Zdrogova N.*

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Bozin Sergej (Krasnojarsk), Bronštejn Mikaelo (Tiĥvin), Ĉupin Bronislav (Ijevsk), Gorškov Miĥail (Niĵegoroda reg.), Ĥmelj Gennadij (Noriljsk), Kandalinskij Viktor (Tiĥvin), Kikavec Jaroslav (Tverj), Kivajev Jurij (Marij El), Konjašova Svetlana (Habarovska reg.), Kuljkov Jevgenij (Vladimir), Kuznecov Aleksej (Kostroma),

Loskutova Tatjana (Ivanovo), Lukjanov Vladimir (Kurska reg.), Neĉajev Nikolaj (Irkutsk), Obrazcov Konstantin (Tomsk), Osokin Aleksandr (Sankt-Peterburg), Roĵdestvenskij Vjaĉeslav (Ĉeljabinsk), Sibirceva Valentina (Lipecka reg.), Sudakov Vladimir (Primorskij reg.), Terentjeva Galina (Ĉeljabinsk), Tonkova Eleonora (Moskvo), Zueva Nina (Jelec)

FAMILIAJ MEMBROJ

Loskutova Maja (Ivanovo), Terentjev Nikolaj (Ĉeljabinsk), Zuev Vladimir (Jelec)

Ĉe la adreso <<http://reu.ru/dok/index.php?dok=membrolisto>> ĉiam eblas vidi aktualan liston de la membroj.

KOTIZOJ DE REU POR 2006

Individua kotizo – 80 rubloj (por eksterrusiaj loĝantoj – 8 eŭroj), inkluzivas la membrokarton, Jarlibron kaj/aŭ Manlibron de REU, REU-bultenon kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj.

Dumviva kotizo – 2000 rub. (por eksterrusiaj loĝantoj – 200 eŭroj) – ĉio la sama dum la tuta vivo.

Familia kotizo – 30 rub. (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj).

Rabatita individua kotizo – nelaborantaj gejunuloj kun la aĝo malpli ol 26 jaroj pagas 50% de la kotizo.

Kolektiva kotizo – 30 rub. por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj), inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro de REU por ĉiu komenciĝinta deko de la aligitaj membroj, aliajn informojn de REU por la kolektivo; la membrokartojn, voĉdonrajtojn en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj por la aligitaj membroj.

Aliĝkotizo – 160 rub., unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. La jamaj aliĝintaj kolektivoj ne pagas ĝin. La nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se la organizaĵo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi estas konsiderata likvidiĝinta kaj poste devus denove aliĝi.

Rabatita abono de REGo – 120 rub. (ekster Rusio – 15 eŭroj), por ĉiuj membroj, escepte de la aligitaj kaj familiaj. La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003, plu ricevados REGon sen aldona pago.

Membroj de REU aŭtomate iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio.

Aliĝilon kaj (poŝtmandate) rublajn kotizojn sendu al: **Чертилову Михаилу Константиновичу, а/я 21, Одинцово-6, 143006 Московская область**. La eŭraj kotizoj pagendas al la konto **reu-a-p** ĉe UEA. (Pri pliaj pagmanieroj informiĝu ĉe Mikaelo Ĉertilov rete <kasisto@reu.ru>, telefone +7-916-2019437 aŭ poŝte laŭ la supre indikita adreso).

Eksciu, ke...

ESPERANTO-SEKCIO EN ŜUMERLJA

Ĉi-jare en Ŝumerlja denove okazas E-kurso, kiun salajrate gvidas Nataŝa Grigorjevskaja. La kurso estas porlernejana kaj okazas en la urba palaco de infana kreado. Partoprenas 11 personoj, ĉefe knabinoj. La ĉi-jara grupo montriĝas multe pli esperantema ol la pasintjara, la unua. Jam ili komencas “klubigi” kaj identigi sin esperantistoj. Kiel la unua komuna agado estis la partopreno en la okazigo de “Karavano” (prezenta programo de Lingva Festivalo) en Ŝumerlja. Ilin eĉ aparte menciis la loka televido, kiu raportis pri la LF-prezento en Ŝumerlja. Ili proprainiciate ankaŭ partoprenis en urba danckonkurso kiel teamo “Esperanto”. Iun el la supraj lokoj ili ne prenis, sed montris sin entuziasma, amikeca kaj kreema teamo.

(esperanto-rus-informoj)

KONGRESA TEMO EN FLORENCO

La temo de la 91-a Universala Kongreso de Esperanto en Florenco en 2006 estas “Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo”. Pri la temo decidis la Estraro de UEA, kiu invitis kiel reĝisoron de ĝia traktado en la UK la ĉilian komitatano de UEA Jose Antonio Vergara. La traktadon de la temo partoprenos la eminenta lingvopolitika fakulo François Grin, profesoro pri ekonomiko en la Universitato de Ĝenevo, kiu festparolos en la kongresa inaŭguro. La temreĝisoro s-ro Vergara <jovergaola@surnet.cl> volonte akceptas proponojn pri aliaj kontribuoj kaj ideojn pri la temtraktado. Ĉiuj estas petataj kunlabori kaj kundiskuti pri la temo jam antaŭ la UK. Por komenca informiĝo UEA rekomendas “Raporton pri Homara Evoluo” de la Evolupprogramo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu estas trovebla en pluraj lingvoj ĉe <<http://hdr.undp.org/reports/global/2004/>>. E-traduko jam estas legebla ĉe <www.tejo.org/uea/traduko_el_HDR_2004>.

(Gazetaraj komunikoj de UEA, № 218)

LETERO EL KABULO

Saluton al ĉiuj tre estimataj samideanoj!

Skribas al vi sincera esperantisto via Saidnabi. Samkiel vi, mi havas koran senton disvastigi Esperanton. Laŭ miaj ebloj de lingvoposedo kaj bonŝance laŭ deziro de KAEM (Komisiono pri Azia E-Movado de UEA) kaj ĝiaj estraranoj, estimataj Hori Yasuo kaj Fukuda Tosihiro, kaj certe kun kontribuo de UEA-Prezidanto, estimata Renato Corsetti, mi venis al Kabulo, por instrui verdan ideon al afganaj KAADEM-anoj en Kabula Universitato. (KAADEM estas la nomo de la esperantista kaj Esperanto-simpatianta grupo en Kabulo.) Estis granda honoro por mi, kaj mi ne laste dankas ĉiujn kontribuantojn kaj devas rimarki, ke la sperto, kiun nun mi havas, estas atingita dank’ al UEA kaj TEJO, ĉar per ilia subvenciado mi povis partopreni en IJK-60 en Rusio, kiu multon donis al mi.

Do, komence enskribiĝis pli ol 150 lernantoj, sed pro tempo-manko je ilia flanko povis partopreni nur iom pli ol duono. Vere, estis planita, ke mi instruos al KAAAdEM-anoj dum 2 monatoj, sed bedaŭrinde pro internaj kialoj de KAAAdEM-anoj mi ne povis plu resti post unu monato, tamen estis diskutitaj programoj, laŭ kiuj plej verŝajne ili denove invitos min aŭ iun alian instruonton denove al Kabulo.

Kvankam la nuna stato estas danĝera, sed sciinte, supozinte tion, kio min atendas en Afgano, mi tamen atingis Kabulon. Do, mi ne volas skribi pri vizaĝo de la urbo kaj kondiĉoj. Interalie nur kelkajn fojojn mi vizitis la urbon (la universitato situas sude de Kabulo), ĉar estas danĝere por fremduloj esti en la urbo sole sen iu amiko; kaj samtempe ĉiuj povas imagi, kiel aspektas la lando/urbo kaj kia povas esti la sanprotekta stato, do miaj impresoj estas tute malĝojigaj.

Do, loĝĉambron kun nutromono prezentis estimata D-rino Husnbanu Ĝazanfar, kiu estas dekano de la lingva kaj literatura fakultato de la Kabula Universitato; aliaj elspezoj, kiujn mi faris, estis kompensitaj de KAEM. Estis organizitaj 4 posttagmezaj senpaŭzaj kursoj, kiuj unue estis distribuitaj inter la 1-a horo ptm ĝis la 5-a horo ptm; sed poste pro Ramadano estis iom ŝanĝitaj la tempoj laŭ ordono de la Universitata Rektoro. Ĉi tie oni ferias vendrede kaj spite tion mi ankaŭ ĉi-tage instruis al kelkaj dezirantoj en gastodomo, kie mi restis – al tiuj, kiuj plu interesiĝis pri la lingvo de Paco. Ĉiuj bezonas pacon, sed ĉi lando ege bezonas ĝin. Spite la malfacilaĵojn mi instruis sincere kaj sindone en ĉi grava Esperanta vivperiodo mia kaj multe klopodis fari por pruvi al mia koro, ke ĉi paĝo de mia sorto ne estas hazarda. Ankaŭ dum matenoj mi okupiĝis pri instruado. Instruante al novaj dezirantoj, kiuj ne povis partopreni en la pasintaj lecionoj, mi distribuis ilin al la diversaj grupoj laŭ ilia nivelo kaj samtempe kore mi instruis al la estimata doktorino.

– Kara najbaro, ĉu vi uzos hodiaŭ vian elektroborilon?
– Jes, nepre, mi bezonos ĝin dum la tuta tago!
– Bonege, do ĉu vi povas pruntedoni por hodiaŭ la fiŝkaptilon?

Do, ĉu estis fruktodona mia instruado aŭ ne? Tempo montros, ĉar gelernantoj bezonas tempon por utiligado de la ricevitaj informoj, kaj samtempe mi volas rimarki, ke fascine belegis studentinoj en miaj kursoj. En la fino de la kurso mi skribis en la tabulo multajn retadresojn, kaj mi petas ĉiujn, kiuj ricevos mesaĝojn de KAAAdEM-anoj: bonvolu korespondi kun ili. Libro- kaj vortaro-bezono estas grandegaj. Alvoko al ĉiuj: Estigu Esperanton en Afgano per via helpo!

*Saidnabi Saidilhomzoda, vicprezidanto de la Taĝika Esperanto-Asocio
Kabul, Afgano, 12.10.2005*

INFANA KONGRESETO EN 2006

En kiu lando naskiĝis Pinokjo, la infano el ligno sed kun koro de infano, kiu ĝojigas ĉiuaĝajn infanojn tra la mondo? En Italujo, kompreneble. Kaj kie en Italujo? Apud la loko de la ĉi-jara Internacia Infana Kongreseto, kiu okazos en Prato, 20 kilometrojn de Florenco, la urbo de la Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Florenco de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2006. La IIK okazos en aparta gastejo por skoltoj, vagantoj ktp, en parko en Prato, kaj oni antaŭvidas ekskursojn al la apuda Kolodi (Collodi), la naskiĝ-vilaĝo de la aŭtoro de Pinokjo,

kie estas amuz-parko por infanoj. Petu informojn ĉe <uk2006.informoj@esperanto.it> aŭ rekte ĉe la ĉeforganizanto de la IIK: Leonardo Pampaloni, <pampal@freemail.it>. Pliaj informoj pri la UK ĉe: <www.ukflorenco2006.it> aŭ <uk2006.informoj@esperanto.it>. (*Informitale*)

72-A IKBE EN FLORENCO

Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj

La 72-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazos en Florenco (Italio) de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2006 en la kadro de la 91-a Universala Kongreso de Esperanto. Ĉiuj kongreslaboroj okazos ĉe “Centro Congressi” (adreso: piazza Adua 1, Firenze), kiu estos ankaŭ sidejo de la UK: ambaŭ aranĝoj konsistigos unuecan programon kaj estos malfermitaj kaj al blinduloj kaj al vidantoj. Anoj de IKBE loĝos kune en du hoteloj, situantaj en du etaĝoj de sama konstruaĵo, kiu troviĝas en la urbocentro je malmultaj metroj de la kongresejo kaj de la fervoja stacidomo. La aliĝkotizoj, por persono dum semajno, estas: en unulita ĉambro 440 eŭroj, en dulita ĉambro 320 eŭroj, en kvarlita ĉambro 160 eŭroj por okcidenteŭropaj, nordamerikaj, japanaj kaj aŭstraliaj kongresanoj, 80 eŭroj por la ceteraj landoj. Tiuj kotizoj validas por la blinduloj kaj respektivaj (po unu) akompanantoj. Oni povas antaŭanonci sian aliĝon perpoŝte al: Daniela Bottegoni, via Rismondo 1, I-60123 Ancona, Italio; tel. +39-07131602, <aldograssinil@tin.it>. Por pagoj oni povas uzi la konton “IABE-X” ĉe UEA, titolitan al: “Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj”. Pliaj informoj pri la 72-a IKBE: <http://www.ukflorenco2006.it/unikodo/tit_ar/libe/>. (*Informitale*)

SAMARKANDANOJ MONTOPINTAS EN JAPANIO

En aŭgusto 2005 samarkandaj esperantistoj Anatoli Ionesov kaj Holikberdi Kozimov (reprezentantoj de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro en Samarkando, Uzbekio) akompane de japanaj pacamikoj Mitsuru Ohba (el Yokosuka) kaj Naohisa Takayama (el Tokio) sukcese atingis la montpinton de Fuji-san. Tie ili flirtigis E-flagetojn, donacitajn de Japana Esperanto-Instituto, kaj la naciajn flagojn de Japanio kaj Uzbekio.

La montgrimpado komenciĝis je noktomezo la 16-an de aŭgusto kaj frumatene la 17-an de aŭgusto la kvaropo jam estis sur la montopinto de Fuji (3776 m). “Regu Paco sur la Tero” – tiu ĉi alvoko eksonis ankaŭ esperantlingve desur la plej alta japana monto...

Anatoli Ionesov
(Uzbekio)



la verda Koro

 kultura revuo

DVD EN ESPERANTO ESTAS MENDEBLA

La DVD kun sonigita en Esperanto soveta filmo “Kin-Dza-Dza!” finfine ricevis decan koloran kovrilon kaj ekde nun estas mendebla. La filmo enhavas elekteblajn kontrakojn kun Esperanta sinkrona traduko aŭ la originala rusa. Oni povas elekti rigardi la filmon kun E-aj aŭ rusaj subtitoloj aŭ sen ajna el ili.

Tio permesas uzi la filmon por plej diversaj celoj, kvankam la ĉefa estas lingvopraktiko en Esperanto. La filmon jam prove vidis kelkaj personoj, ili konfirmis, ke por tiu celo la E-a sonigo plene taŭgas.

La kosto de unu DVD estas 120 rub. (ekde 3 ekz. – po 100 rub.). Versio en la formato MPEG4 (nur E-a sono kaj subtitoloj) kostas 80 rub. La sendokostoj estas 25 rub. por DVD kaj 20 rub. por KD (+5 rub. por ĉiu plia ekzemplero). La monon necesas sendi al: 429120, Республика Чувашия, Шумерля, ул. Ленина 40 – 14, Григорьевской Наталье Станиславовне. La mendoj estas akceptataj nur por la rusiaj adresoj.



(esperanto-rus-informoj)

ABONEBLAJ REVUOJ KAJ UEA-MEMBRECO EN 2006

“La Ondo de Esperanto”, internacia magazino, ĉiumonata; 24 paĝoj, 340 rubloj.

“Esperanto”, oficiala organo de UEA, ĉiumonata; 24 paĝoj, 17 eŭroj.

“Kontakto”, socikultura revuo de TEJO, dumonata; 16 paĝoj, 10 eŭroj.

“Heroldo de Esperanto”, trisemajna informa gazeto; 4 paĝoj, 32 eŭroj.

“Literatura Foiro”, kultura revuo, dumonata; 56 paĝoj, 30 eŭroj.

"Femina", revuo en Esperanto ne nur por virinoj, trimonata; 28 paĝoj, 20 eŭroj.

“Juna Amiko”, revuo por lernejanoj kaj komencantoj, trimonata; 32 paĝoj, 9 eŭroj.

“Monato”, internacia magazino sendependa, ĉiumonata; 32 paĝoj, 23 eŭroj; reta versio – 13,8 eŭroj.

“La Jaro”, praktika poŝkalendareto de “Monato”; 160 paĝoj, 5 eŭroj.

"La Gazeto", mondkultura, esperantistisma, sendependa, dumonata; 32 paĝoj, 8 eŭ-roj.

“Litova Stelo”, organo de Litova E-Asocio, dumonata; 32 paĝoj, 7 eŭroj.

“La Kancerkliniko”, politika, kultura, skandalema, trimonata; 32 paĝoj, 7 eŭroj.

Ruslandanoj kun la Esperanta civitaneco rajtas je sociala rabato de 50% ĉe abono por “Femina”, “Heroldo de Esperanto”, “Literatura Foiro”. Ili pagas por unu jaro, sed ricevas du jarkolektojn (2006-2007).

Membreco en UEA. UEA estas la plej grava kaj aktiva esperantista organizo. Ĝi havas pli ol 6 mil individuajn membrojn en 120 landoj, ĉ. 100 aliĝintajn landajn kaj fakajn asociojn kaj la junularan sektion TEJO. UEA havas konsultajn rilatojn kun UN kaj UNESCO.

MG. Individua Membro kun “Gvidlibro tra la Esperanto-movado”: 4 eŭroj

MJ. Individua Membro kun “Jarlibro” (kaj ĝis inkl. 29 jaroj membro de TEJO kun “Kontakto” sen plia abonpago): 11 eŭroj

MA. Individua Membro (kiel MJ plus la revuo “Esperanto”): 28 eŭroj

La jamaj membroj de UEA indiku sian UEA-kodon. Novaj membroj petu aliĝilon ĉe Halina Gorecka.

Pagmanieroj. Konvertu la eŭran prezon al rubloj laŭ la oficiala kurzo kaj aldonu 2% por kovri la diferencon inter la oficiala kaj banka vendokurzoj. La kotizojn akceptas Галина Романовна Горещкая poŝte (236039, Калининград, аб. ящик 1248), banke (petu informojn pri la banka konto) kaj elektronike (“Яндекс.Деньги”, счёт 4100138523456). La retadreso por informoj kaj demandoj – <sezonoj@gazinter.net>.

(esperanto-rus-informoj)

SEP BIBLIOTEKOKJ RICEVIS THORSEN-APOGON

La estrarano de UEA pri kulturo Claude Nourmont kaj ĝenerala direktoro Osmo Buller asignis subvenciojn al ok Esperanto-bibliotekoj el la rimedoj de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. UEA disdonas ĉiujare ekde 1997 subvenciojn el la monsumo, kiun la konata dana esperantista paro donacis por pliriĝigi la kolektojn de bibliotekoj, kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. En 2005 disponeblis 1000 eŭroj. Al Slovakia Esperanto-Biblioteko oni asignis librojn je la valoro de 80 eŭroj. Triesta Esperanto-Asocio (Italio), Kultura Centro de Esperanto (Campinas, Brazilo) kaj Fonduso Cesar Vanbiervliet (Kortrijk, Belgio) ricevis po 100 eŭrojn. Provinca Filio Havano de Kuba Esperanto-Asocio ricevis 195 eŭrojn kaj Esperanto-Societo “Cele-kula” (Nis, Serbio) 200 eŭrojn. La plej grandan subvencion, 225 eŭrojn, ricevis Hubei-a Esperanto-Asocio (Ĉinio). Petoj pri subvencioj en 2006 devos atingi la Centran Oficejon ĝis la 15-a de oktobro 2006. Kun la peto necesas sendi liston de dezirataj libroj, kiuj estu ordigitaj laŭ dezirindeco.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA, № 219)

Internacia Esperantista Asocio por Verkistoj kaj Pentristoj (IEAVP) estis fondita en komenco de 2005, ĝi estas por tiuj, kiuj verkas per Esperanto kaj pentras ilustraĵojn por siaj verkoj. La interesiĝantoj kontaktu: D-ro Wang, p/k 130, 354065 Soĉi-65; fakso +7-8622-686310, retadreso <wang@fromru.com>.

KIA DEVAS ESTI MODERNA RUSA-ESPERANTA VORTARO

Esperanto-rusaj vortaroj servas plejparte por lernado kaj lego de E-literaturo. Rusa-Esperanta vortaro estas bezonata unuavice por tradukistoj.

Miloj da vortoj revenas al ĉiutaga uzado en la rusan post preskaŭ centjara forgeso. Leksikografoj rapide ŝtopas konsiderindajn truojn, aperigante, ekzemple, novan Grandan angla-rusan vortaron de religia leksiko, kiu enhavas pli ol 25000 vortojn sur pli ol 800 paĝoj (Азаров А.А. Большой англо-русский словарь религиозной лексики. М.: Флинта: Наука, 2004). Kompreneble same Esperanto-ekvivalentoj por tiuj vortoj estas ĉiupaŝe bezonataj por traduki klasikajn verkojn en Esperanton. Ankaŭ multaj modaj aŭtoroj same ĉerpas el retro-vortoj, verŝajne, inspiron por siaj novaj verkoj. En tekstoj de Akunin arkaismoj superabundas, ni renkontas *arkidukon* (ĉe Lukjanenko), *valovanon* (ĉe fratoj Strugackij).

La Rusa-Esperanta Vortaro de E.Bokarev (REVB), 1966, kaj des pli Esperanto-Rusa Vortaro de la sama aŭtoro (ERVB), 1974, ĝis nun restas la plej popularaj vortaroj en nia lando. Unuavice tio dankendas al profesie altmodela konstruo de la vortaroj. Due, dank' al grandaj eldonkvantoj, ili iĝis vere "popolaj". Tamen, sendube, dum preparado de ambaŭ estis uzata tiel nomata "oficiala vortlisto de rusaj vortoj", kiu estis bezonata por ĉiuj eldonataj vortaroj de tiu periodo, kaj kiu, verŝajne, esence bridis la kreaŭ impeton de la aŭtoroj. Tiun "avantaĝon" de REVB klare sentas esperantistoj-tradukistoj jam eble dum lastaj 30 jaroj. Antaŭ 40 jaroj, por traduko de soci-politikaj tekstoj en Esperanton, ĉe eldonejoj "APN" kaj "Progreso", REVB kaj ERVB estis preskaŭ centprocente sufiĉaj, la tradukistoj povis permesi al si ne ofte konsultiĝi kun PIV. En fino de la 80-aj jaroj la situacio pri tradukoj en Esperanton esence ŝanĝiĝis. Por traduki, ekzemple, "Fatalajn ovojn" de M.Bulgakov, la tradukisto jam demetis REVB-on al la dua pozicio, lasante ĉefan lokon en sia laboro al PIV, sed konsulto kun PIV (ĉar ĝi estas konstruita laŭ aliaj principoj) rabas pli multan tempon de la tradukistoj en serĉo de bezonataj ekvivalentoj.

Estas fenomeno, sed "Granda Rusa-Esperanta Vortaro" (GREV) de V.Kolĉinskij kaj I.Izgur, aperinta en 1931, estas nun pli aktuala por tradukistoj ol REVB, dank' al rimarkebla tavolo de parolataj vortoj, abunda religia leksiko, granda kvanto de la vortoj, uzitaj en la 19-a jarcento. Mi supozas, ke la rusan vortliston de tiu vortaro ne tuŝis la krajono de cenzuristo. La legadon de GREV ne malhelpas ioma kvanto da aktualaj nur por tiu tempo esprimoj kiel, ekzemple, "korespondantino pri virinaj problemoj", "virinorganizanto", "virinsekcio". Male, tiuj vortoj aldonas al la vortaro ioman ekzotikan ĉarmon. GREV havas solan gravan mankon: ĝi estas granda raraĵo.

Kompreneble, ke pro historia kaŭzo, en REVB kaj GREV ne estas ankaŭ granda kvanto da novaj vortoj.

Nuntempaj leksikografoj akceptas dividon de la vortaroj depende de ilia amplekso je tri kategorioj: malgrandaj – ĝis 20 000 vortoj; mezaj – de 20 000 ĝis

Ĉe bushaltejo maljunulino demandas iun viron:

– Kiun buson mi uzu, por trafi al la tombejo?

La viro post ioma pripenso respondas:

– Verŝajne tiun, kies bremsoj misfunkcias.

80 000 vortoj kaj grandaj – pli ol 80 000 vortoj. Do, eĉ “Granda Rusa-Esperanta Vortaro” de V.Kolĉinskij kaj I.Izgur enhavas nur ĉirkaŭ 28 000 vortojn kaj apartenas al la mezgrandaj vortaroj.

Moderna rusa-Esperanta vortaro, por esti utila al tradukistoj, miavide, devas sekvi jenajn principojn:

- 1) enhavi ne malpli ol 20 000 vortojn (do esti ne malpli ol meza);
- 2) baziĝi sur oftecvortaroj de la rusa lingvo kun enkonduko de novaj vortoj;
- 3) esti retro-vortaro (enhavi vortojn, denove ekuzatajn en la moderna rusa);
- 4) konsideri vastan tavolon de parolata leksiko;
- 5) esti “popola” vortaro – vendiĝi en multaj vendejoj kaj esti malmultekosta.

Aleksandr Ŝevĉenko (Moskvo)

Januare de 2006 aperos la dua eldono de Rusa-Esperanta Vortaro (kompilinto Aleksandr Ŝevĉenko) ĉe la eldonejo “Impeto”. Ĝi estas reviziita kaj pligrandigita je proksimume 500 vortoj, kiuj pro diversaj kialoj maltrafis la unuan eldonon. Grave helpis en plibonigo de la dua eldono Nikolao Gudskov. Ni ankaŭ ricevis kaj atentis kelkajn notojn, venintajn al la eldonejo letere kaj retpoŝte. Entute por la 2-a eldono, estis faritaj pli ol 2500 ŝanĝoj.

La eldonejo “Impeto” aperigis novan Esperanto-Rusan Vortaron. Kompilintoj – Aleksandr kaj Jelena Ŝevĉenko, 19000 vortoj, 43000 signifoj en la rusa. La vortaro enhavas mallongan gramatikon. Prezo – 80 rub. Aĉeti eblas ĉe Moskva Esperanto-Centro, <esperanto@servocentro.ru> aŭ <esperanto@e-mail.ru>.

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)

NOVAJ VERSAĴOJ KAJ TRADUKOJ

Vi estas la amo

La vivo nin lulas
Ne ĉiam kun milda kares’.
Pontaro forbrulas,
Konstante altiĝas la prez’
De ŝajna proksimo,
Apenaŭ fidinda kompren’...
Ni haltis ĉe limo,
Kaj poste ne eblas reven’.

Necertaj rilatoj
En sombra malhel’.

Scivolaj konatoj
Kun stulta malhelp',
Hontiga fifamo,
Ĵaluzo, envi'...
Vi estas la amo,
Kaj mi apartenas al vi.

Parolo senvorta –
Nur neĝo, falanta sen fin' –
Kovrilo komforta,
Sub kiu varmiĝos la sin',
Travivos trankvile
La vintron ĝis nova printemp',
Degelos humile,
Ĉar venkas ofendojn la temp'.

Jen sorto de neĝo, –
Solvegi ĉe l' sun', –
Post morna sieĝo,
La fola fortun',
Anima inflamo,
Ne eblas devi':
Vi estas la amo,
Kaj mi apartenas al vi.

Trotad' kalendara –
Oscedo, vigliĝo, ekmov'.
Padeto neklara
Serpentos al ia bontrov',
Invitos nin de la
Senluma sopira nekred'
Al fajro kandela
En nia feliĉa ĉambret'.

Jen do itinero:
Kvieta parol'.
Ripozas la tero
Sub neĝa tavolo.
En stela ornamo
Fajret' de avi'.
Vi estas la amo,
Kaj mi apartenas al vi.

oktobro 2005

Birdotimigilo

Mi staras en legomĝarden',
Kaj la ĉielo bluas.
La malamikoj jen kaj jen
Singarde preterflugas.
Bongustaj beroj estas cel'
Por vicaj ŝtelatakoj,
Sed staras bona sentinel'
Inter la dolĉaj fragoj.

Mi estas birdotimigil',
Jen miaj malamikoj:
Tumultas nun en maltrankvil'
Monedoj kaj kornikoj,
Ĉar tremas en la dekstra man'
Tre suspektinda kvasto,
Por la birdaĉojn en avan'
Forpeli sen prokrasto.

Mi havas veston kiel hom':
Ĉapel', ĉemiz' purpura...
Sed estas mi nur la moknom'
Por la infan' malpura.
Ho, jen la kaŭzo por humil'
Kaj tre ofenda miso!
Kultura birdotimigil'
Laboras sur paliso!

Bonvolu fiksi en memor'
Kaj paĉjo kaj patrino:
Inteligentas mia kor'
En la ĉifona sino.
Mi servas digne kaj ne plu
Toleros la mokridon –
Al mi direktu por instru'
Malakuratan idon!

oktobro 2005

Mia kateĉjo rufa

Mia kateĉjo rufa
Dormas dum vintraj tagoj.
Post la somera viglo
Logas kviet', trankvilo.

Kaŝas en varmo pufa
Sin de l' eksteraj blagoj
Mia kateĉjo rufa.

Mia kateĉjo rufa,
Sep kilogramojn peza,
Tuj kun osced' vekigas.
De-sur kusen' levigas,
Trotas kun spiro snufa
Al bongustaj' tagmeza
Mia kateĉjo rufa.

Mia kateĉjo rufa
Nokte laŭ ĉambroj vagas.
Estas la nokt' por movo,
Serĉo, embusko, trovo.
Do en impeto blufa
Beton ĉe l' pord' atakas
Mia kateĉjo rufa.

Mia kateĉjo rufa
Ĉiujn dormantojn vekas!
Vanas embusk', impeto –
Mankas en hejm' museto!
Per okulparo gufa
Streĉe krepuskon strekas
Mia kateĉjo rufa.

Mia kateĉjo rufa,
Saltu, miaŭu, kuru!
Ludu kun mi dum tago
Vi post la nokta vago.
Nokte kun mildo mufa
Vi apud mi murmuru,
Mia kateĉjo rufa...

novembro 2005

David Samojlov

Dueto por violon' kaj aldo

Mocart paŝis ebrieta
Al la hejm'.
En admira malkvieta,
Fola plej.

Kaj la homojn gajokula
Ŝatis tre
Komponisto Mocart Wolfgang
Amade'.

Sonoretis foliaro
De tili'.
"Tili-tiki, tara-tara" –
Pensis li.

Certe jes! Rutina bono –
Drinka vant'!
Sed – duet' por violono
Kaj por ald'!

Sian arton li disdonas
Sen repag'.
Multajn sentojn li bezonas
Kun imag'!

Komponisto Mocart Wolfgang,
Lerta vir' –
Donos, kion homoj volas,
Laŭ dezir'.

Ve! Enhejme plej verŝajne –
Draŝ', incit',
Kaj tutcerte por semajno –
Nigra frid'.

Sen ridet', sen parolsono
Muta halt'.
Sed – duet' por violono
Kaj por ald'.

Jes! Do estu lia pago
Sen protest'
Por ĝuinda gaja blago
En la fest',

Por ebrio sen pardono,
Tutegal'!
Ja – duet' por violono
Kaj por ald'!

tradukita en novembro 2005

David Samojlov

Romanco

Elektu karton bonan,
Aŭguru, ciganin',
Forrabu tutan monon,
Sed juna faru min!

Komplete prirabita,
Nelerta junulet',
Mi prenos la kaleŝon
Kun rufa ĉevalet'.

Vi diru do, koĉero,
Kien ni iras nun?
Ja en la poŝ' mi havas
Ridindan groŝon nur.

Respondos la koĉero:
– Veturu do sen pag'.
Vi mem ne scias, bubo,
Finpunkton de la vag'.

Ne juna, ne maljuna,
Ne viva, ne sen viv',
Komplete prirabita
Tra Moskvo paŝos mi.

Sed jen – kortet' konata,
Tolaĵa sekigej'.
– Hej do, Tatjana mia,
Min lasu en loĝej'.

– Indulgu min, amato,
Ne povas lasi mi.
Neamon mian foran
Ja ne indulgas vi.

Mi flanken iros trista –
Forgeso, rememor'.
– Nelonge vin, Tatjana,
Mi tenis en la kor'!

Forgeso – malforgeso.
Kaj hel'. Kaj vea am'.
Kaj tio, kio estos,
Okazis foje jam.

tradukita en novembro 2005

Lena Karpunina (Germanio)

M i r t

Mi renkontis lin en la karcero. Kun kiu etapo li venis? Verŝajne kun la Moskva. Min mem oni venigis pli frue kun la Siberia. Do, ni konatiĝis, iom interparolis. Ni ambaŭ estis laborrifuzantoj – ni rifuzis iri en la tajgon faligi arbojn ĉe kvardekgrada frosto. Arestitojn, kiuj ne volis labori, oni metis en nehejtitan karceron, kie ili ricevis nenion krom peceto da pano kaj kruĉo da akvo unufoje tage.

Tiam, en 1948, li estis en mia aĝo, do proksimume dudekjara fortosta blondulo. Liaj rapidaj kaj precizaj movoj kaj reagoj memorigis pri linko. Li tuj plaĉis al mi: ĉu pro la malfermita kaj iom aŭdaca vizaĝesprimo; ĉu pro liaj simplaj, sed afablaj manieroj; ĉu pro iu ĉarmo, kiun oni malfacile povas difini per vortoj, sed kiun oni tuj sentis? Li diris, ke li estas finno kaj nomiĝas Mirt.

Post iom da tempo ni denove renkontiĝis en la sama loko, poste – refoje. Ĉar ni ambaŭ daŭre rifuzis labori, ni konstante “sidis” en la karcero, kiu estis eta ĉambro, konstruita el arbotrunkoj, metitaj unu sur la alia. Tra la fendoj inter la traboj trapenetris frosta aero, sed ankaŭ iom da lumo, se ekstere estis hele, kaj tiam mi povis vidi la vizaĝon de mia kamarado. Mirt rakontis al mi pri la dua mondmilito, kies partoprenanto li estis.

Li eniris la militon kiel volontulo en 1942, asertante, ke li havas dek ok jarojn. Li havis tiam nur dek kvar jarojn, sed li mensogis pri sia aĝo por ke oni sendu lin al la fronto. En la armeo Mirt ne rolis knabeton, sed batalis en esplortaĉmento, kiun oni kutime sendis antaŭ la regula armeo por esplori la cirkonstancojn. Kiel batalanto li estis tre kuraĝa, eĉ aŭdaca. La vorto “timo” estis al li nekonata. Li parolis la germanan, rusan kaj finnan lingvojn. Kiam lia grupeto foje nokte koliziis kun germana patrolo aŭ kun gardistoj, kiuj demandis: “Haltu! Kiu estas?”, Mirt respondis en la germana: “Unu el viaj...” kaj tuj mem ekatakis la malamikon. Oni ĉiam prenis lin en esplorgrupojn, ĉar li estis kiel sorĉbastoneto. Li estis simple neanstataŭebla.

Unu lia frontrakonto aparte restis en mia memoro:

“Unu tagon, kiam nia grupeto estis ĵus reveninta post plenumo de iu tasko kaj devis ripozi, la aliaj taĉmentoj batalis kontraŭ iu entera mitralnesto de la germanoj. Mi ekrigardis la batalkampon kaj konsterniĝis: k-i-o-m da homoj mortis pro tiu mitralnesto!

Ĝi estis tiel firme kaj ruze konstruita, tiel bone de ĉiuj flankoj protektita, ke oni ne povis ĝin konkeri, kaj la ofensivo de nia bataliono estis haltigita. La mitralnesto troviĝis sur monteto kaj aspektis kelketaĝa. La malamikaj mitraloj pripafis ĉion ĉirkaŭ si en cirklo de 360 gradoj. Ĉirkaŭ ĝi kuŝis montoj da mortpafitaj soldatoj.

Dum kelka tempo, rigardinte la malsukcesajn atakojn de nia flanko, mi diris al la komandanto:

“Permesu al mi iri tien!”

“Vi? Ne. Vin mi bezonas...”, respondis tiu, “vi estas esplorbrigadano, mi ne

permesas...”

Denove mi gvasis kelktempe, kiel la germanoj senĝene falĉas niajn homojn: de supre ili povis bone observi, lasante neniun alproksimiĝi. El granda distanco ili pereigis ĉion vivan.

Anstataŭ ripozi, mi staris apud la komandanto, rigardanta la batalkampon, kaj vidis pereji niajn sendefendajn armeanojn. Li diris:

“Iru, Mirt, iru ripozi... La mitralneston oni prenos sen vi... Se ne la soldatoj, tiam certe la aviadiloj... Ili atakos kaj superŝutos ĉion per bomboj...”

Mi kolere respondis:

“Mi tamen iros... Kiom da soldatoj mortos, ĝis venos viaj aviadiloj?!”

“Nenien vi iros!”, ekkriis la estro, “Mirt! Haltu! Mi vin punos!...”

Mi sendis lin al la diablo kaj hastis direkte al la mitralnesto.

Kiel mi sukcesis traperetri al ĝi? Tra la nuda tereno kaj nuboj da mitralkugloj? Mi mem ne scias... Gravas, ke mi sukcesis alrampi ĝin kaj enĵeti en la unuan tere-
taĝan fenestron faskon da grenadoj... La eksplodego tremigis la teron. Mi atendis iomete kaj poste ensaltis en la ejon, kien mi enĵetis la grenadojn. Niaj soldatoj vidis tion. Do, ili ankoraŭ iom atendis. Sed post kiam mi ensaltis la mitralneston, ili tuj leviĝis kaj ekkuris antaŭen... De ĉiuj flankoj ektondris la kanonado. “Hur-a-a!” – aŭdis mi. Kaj tuj, en la momento, kiam ĉiuj niaj ekmoviĝis, subite denove krakis mitralsalvo. Komence mi ne komprenis de kie, la salvoj venis rekte de super mia kapo. Mi prenis germanan mitralon, kiu kuŝis apude, metis ĝin sur mian ventron kaj ekpafis supren, en la plafonon. Varmegaj kartoĉmanteloj ekŝutiĝis sur min... La mitralo estis pezega, same ĝiaj kartoĉoj. Tio ne estis nia malpeza “Maksim”¹. Estis kirasfrakasaj kugloj, altkvalitaj kaj pezaj, kiel ĉio ĉe la germanoj. La ligneroj de dikaj traboj kaj la terpbuloj hajlis sur min. Post multfoja pafado mi haltis kaj atendis. Nenio. Denove aŭdiĝis nia kanonado, kaj denove mi aŭdis: “Hur-r-a-a!”... Kaj mi vidis, kiel min preterkuras niaj soldatoj. Nu, jen, estis ĉio... Mi iris al nia fosajdometo kaj kuŝiĝis por dormi: mi ja havis libertempon...”

Tiel Mirt tramarŝis, trabatalis la tutan militon. Ĉar li estis kuraĝulo, oni prenis lin ĉien: ĉu por akiri nutraĵon, ĉu por trovi germanan spionon – ĉie li estis bezonata kaj utila. Li ne nur bone pafis, kuris, saltis, sed ankaŭ bonege manbatalis kaj agis per tranĉilo. Li kapablis ĉion kaj sola povis anstataŭi dek soldatojn.

Nu, jen... La milito finiĝis. Mirt tiam havis nur dek ok jarojn, sed li estis jam sperta soldato, kun multaj ordenoj kaj medaloj, de ĉiuj respektata kaj ŝatata frontarmeano, heroo. Oni venigis lin al Moskvo: iu generalo kunprenis lin en la militistan stabon por labori. Tie Mirt deĵoris kiel kuriero, disveturigis per motorciklo la sekretan poŝton.

Iun tagon li estis komisiita transporti paketojn al iu loko. Li ekveturis, sed al la stabo ne revenis. Ie survoje li konatiĝis kun knabino kaj traamindumis kun ŝi plurajn tagojn. Nu, li estis juna, bela, alloga kaj... sur motorciklo! Li forestis de la stabo precize tri diurnojn.

¹ “Maksim” – malpeza mitralo

Sekve, oni deklaris Mirt dizertinto kaj kondamnis lin al dek jaroj da prizono. Tiam, tuj post la milito, dizertado estis severe punata, kutime per mortpafo. Sed lin oni kompatis – pro lia juneco, pro liaj heroaĵoj dum la milito – kaj kondamnis lin nur al dek jaroj da punlaboro en Siberio...

Do, tiel ni pasigis la tempon en la karcero. Mirt multe rakontis, mi aŭskultis. Kaj jen iun tagon venas gardisto kaj demandas:

“Kiu el vi volas labori en la divizia kuirejo? Senŝeligi la terpomojn?”

Vidalvide de nia prizono situis la divizio, kie loĝis la soldatoj, servantaj en nia malliberejo. Apude estis la soldata kuirejo. Labori tie ŝatis ĉiu arestito, ĉar post la laboro ni, kronikaj malsatuloj, nepre ricevis ion por manĝi: iun akvecan supeton aŭ, se oni bonŝancis, eĉ nefinmanĝitajn pecetojn da pano. Fakte, oni tion eĉ ne kalkulis kiel veran laboron...

Do, kiam la soldato demandis: “Kiu volas?”, mi tuj eksaltis: “Mi! Mi iros!” Fakte, ni ambaŭ, mi kaj Mirt, montris nian pretecon kaj diris:

“Prenu nin ambaŭ. Ni ambaŭ iros...”

“Ne”, diris la soldato, “du homojn mi ne bezonas. Unu sufiĉas”, kaj li elektis min.

Kiam mi vespere revenis, Mirt demandis:

“Nu? Kiel estis? Ĉu ili donis ion por manĝi?”

“Jes, iomete: duonteleron da supo ili verŝis por mi. Mi manĝis. Sed mi ne nur senŝeligis terpomojn... Mi krome segis ĉe ili hejtlignon, malantaŭ la barako, tie, kie ĉe ili staras la skioj...”

“Kio?!...”

“*Skioj* staras ĉe ili malantaŭ la kuirejo”, ripetis mi, pensante, ke li misaŭdis.

“*Kie* staras ĉe ili la skioj?” – mirigite redemandis Mirt.

“Nu... survoje de la kuirejo al la barako. Tie ili staras ĉe la skitrako, bonorde vicigitaj unu apud la alia... Por ĉiu soldato po unu paro...”

“Aŭskultu... ĉu ne eblas ŝteli unu paron?” demandis Mirt ekscitite.

“Jes, eblas”, diris mi, “nur unu gardisto estas tie, apud la barako. Parto de la soldatoj deĵoras en la prizono, aliaj dormas kaj ripozas, sed ili ripozas ja ne en la kuirejo...”

“Se vi morgaŭ denove tien iros ... aŭ mi ..., ne, prefere vi iru... Tiam prenu unu paron da skioj kaj kaŝu ĝin horizontale en la neĝo... Kaj bone memoru la lokon, tiel, ke vi poste povu priskribi ĝin al mi...”

“Tion mi faros”, diris mi, “estas facile...”

Sekvatage denove venis la soldato el la garnizono:

“Kiu venos en la divizion por haki hejtlignon?”

La soldatoj donis al la arestitoj specialan segilon, “arketo” ni ĝin nomis, per kiu eĉ unu homo povis segi lignon, tiajn speciale diverĝajn dentojn ĝi havis. Eĉ se la abio “tremetis”, eĉ tiam la dentoj ne blokiĝis inter la ligneroj.

Do mi leviĝis: “Mi iros.” Mirt ekpuŝis min flanken, kaj mi legis en liaj linkaj okuloj: “La skiojn ... la skiojn por mi ne forgesu...”

“En ordo,” diris mi kaj foriris. Mi segis la lignon por la garnizono, embuskante oportunan momenton. La gardisto ne tro atentis min, ĉar li verŝajne ne supozis, ke iu povus ŝteli la skiojn. La malsategaj arestitoj kutime pensis nur pri io manĝebla... Do, en taŭga momento mi prenis unu paron de la skioj, starantaj kiel ĉe ekspozicio, kaj

enŝovis ĝin en la neĝon. Farite! Post la laboro oni denove donis al mi iom da supo.

Vespere mi revenis en la karceron. Mirt demandis:

“Nu? Kaj?”

“Mi prenis la skiojn”, diris mi.

“Brave. Kaj kie vi kaŝis ilin?”

Nu, mi rakontis al li: jen tie... Li diris:

“Bonege! Kiam finiĝos miaj dek pundiurnoj ĉi tie en la karceroj, mi iros kaj prenos ilin...”

Estis klare, ke li decidis forkuri. Malgraŭ ke ĉiuj sciis, ke dum la kvinjara ekzistado de tiu ĉi malliberejo eĉ ne unu persono sukcesis fuĝi. Ne pro tio, ke oni ĝin pli bone gardis ol la aliajn malliberejojn, sed ĉar la prizonon ĉirkaŭis krutaj rokoj, kiujn oni povis venki nur per helikoptero. Cirkulis legendo, ke iu cigano sukcesis fuĝi per la aviadilo, kiu alportis la poŝton.

Nu, jen, vespere: “drum-brum” – ekbruegis la karceraj seruroj, aperis soldato:

“Kiu segis hodiaŭ la hejtlignon en la divizio?”

“Mi segis...”, diris mi.

“Kaj kie estas la skioj?!”

“Ki-i-o? Kiuj skioj? Ĉu vi deliras? Lasu min trankvila, skabia hundo... Mi ja skii eĉ ne scipovas...”

“Ĉu ne vi prenis la skiojn!?”

“Iru for... kun viaj skioj kaj kun viaj problemoj... La tutan tagon mi segis por vi lignon por telereto da akveca supaĉo, kaj nun vi volas ankoraŭ ricevi de mi iujn skiojn...!”

Mirt, aŭdante tion, definitive komprenis, ke la skioj estas jam “en lia poŝto”.

Al mi mem tamen ne helpis mia defenda vortatado: oni decidis transporti min en alian malliberejon. Mi preskaŭ antaŭvidis tion kaj jam pensis: “Tiu ĉi hundaj filoj certe forigos min de ĉi tie pro la skioj... Kien mi trafos? Ne estis bona ĉi prizon, sed ĉiu alia povas esti ankoraŭ pli aĉa...”

Sendube oni konjektis, ke mi ŝtelis la skiojn por fuĝi. Sed oni ne povis scii, ke mi faris tion por iu alia. Do, post du tagoj de strikta observado oni forsendis min, gardatan de du soldatoj, en alian prizonon, kelkcent kilometrojn for de tie, kie mi amikiĝis kun Mirt.

Pasis tri jaroj. Iun tagon mi sidis en tajgo ĉe lignofajro kun la aliaj arestitoj. Varmigante sin ĉe la fajro, ili regalis unu la alian per rakontoj. Unu el la plej ŝatataj temoj estis fuĝo el malliberejo. Iu diris:

“Tiu ĉi prizon estas truo en la ĉielo – forkuri de ĉi tie ne eblas... Tiaj krutaj altaj rokoj... Ne... Kiom da jaroj mi sidas ĉi tie kaj ankoraŭ ne aŭdis, ke iu sukcesis fuĝi. Provis multajn, sed sukcesis neniu: ili ĉiuj estis revenigitaj aŭ mortpafitaj... De ĉi tie fuĝi ne eblas...”

“Eblas!” – diris alia voĉo. “El nia zono forkuris unu... finno, junulo... kaj vi ja scias, ke finnoj estas bonegaj skiantoj, la plej bonaj en la mondo! Li sukcesis ŝteli skiojn el divizio kaj fuĝis...”

Dum ni tiel parolis, al la lignofajro venis unu el niaj gardistoj, forta ruĝhara soldato kun mitraleto. Ankaŭ li sidiĝis kaŭre apud la fajro por varmiĝi. Li ne parto-

prenis nian konversacion, ŝajne eĉ ne aŭskultis ĝin, sed koncentrite observis, kiel la ora flamo de la fajro formanĝas la restojn de lignaĵoj, belajn branĉojn de koniferoj. Ni ne atentis lin. Sed subite, dum ekestinta paŭzo, la gardisto, ne fortunante la rigardon de la flamo, diris:

“Jes, li forkuris, tiu finno... malaperis senspure, kaj oni neniam plu aŭdis pri li... Se sovaĝaj bestoj ne formanĝis lin, tiam li saviĝis. Jes, mi bone memoras lin...”

Kaj same senmove kaj koncentrite rigardante en la fajron, kvazaŭ li vidas en ĝi ĉion, pri kio li rememoras, la gardisto rakontis:

“Tio okazis antaŭ kelkaj jaroj. Dum tri tagoj kaj noktoj ni postkuris lin, fakte – ne lin, sed la spuron de liaj skioj. Ni sekvis lian skitrakon, kiu montris, ke li ankoraŭ kuras, sed lin mem ni eĉ de malproksime ne vidis. Ni persekutis lin kun la espero, ke iam li laciĝos, haltos, eble ekdormos, eble falos surteren malsata kaj senforta, kaj tiam ni lin kaptos aŭ mortpafos... Sed krom liaj spuroj ni vidis nenion. Je la kvara tago ni, tre lacaj, subite venis al grandega intermontejo. La tero finiĝis, la skitrako de la fuĝinto kvazaŭ dissolviĝis en la aero. Antaŭ ni kuŝis abismo. Aliflanke de ĝi la montaro daŭris, sed kiel trafi tien? Flugi ni ne scipovis... Ĉu la fuĝinto sukcesis transpasi la intermontejon? Eble li falis en ĝin, eble li decidis iri alidirekten. Ni staris sur la roko kaj observis la montoĉenon antaŭ ni. Kaj subite ni vidas – jen li! Sur la alia flanko. Kaj li flugas tra la aero sur siaj skioj en la direkton for de ni kun tia terura rapideco, ke ni por kelkaj sekundoj ĉesis spiri... Surteriĝinte post tiu ĉi saltego, li ĉirkaŭis grandegan ŝtonon, poste uzis la alian monteton kiel saltotabulon kaj denove flugis kelkdek metrojn tra la aero. Ni nur vidis, kiel flirtas en la frosta aero lia prizonjako! Kaj for li estis! Surteriĝinte ie malantaŭ roko, kie ni ne plu povis vidi lin... Ni, kvin fortaj viroj, interŝanĝis la rigardojn: tien ni ne kapablas iri, ni eĉ ne povis imagi, kiel li sukcesis venki la abismon. Kiel ni trafu sur la alian flankon? Kaj por kiu celo? Atingi, kapti lin ni neniam povos, same kiel ni ne povas postkuri kaj kapti la venton. Sole dum tiuj kelkaj sekundoj, dum kiuj ni lin vidis, li ŝajnis malproksimiĝi de ni je kelkaj kilometroj... Li flugis antaŭen kiel kuglo... Ne... Ni decidis reiri al la divizio. Ni interkonsentis raporti al la estroj, ke la neĝoŝtormo forblovis liajn spurojn, kaj ni ne sciis, kien daŭrigi. Verŝajne la fuĝinto frostmortis en la montaro. Jen kion ni diris en la divizio.

Sed forgesi lin, lian flugadon inter la rokoj mi ne povas... Neniam mi vidis ion similan... Neniam iu alia sukcesis eskapi de ĉi tie...”

Mi ekridis. Mi sentis min tiel, kvazaŭ ne Mirt, sed mi mem estis la sukcesa fuĝinto.

“Tio estis Mirt,” diris mi. “Kaj mi, mi ŝtelis por li la skiojn... Li estis mia amiko...”

Poste ni silente sidis ĉe la lignofajro, rigardante la malproksimajn rokojn de Monta Ŝorio¹. Ŝajnis, ke ĉiu el ni imagis, kiel ĉe la horizonto, ie inter tero kaj ĉielo, super neĝkovritaj rokoj, flugas Mirt sur siaj skioj, konkurante kun la vento, kaj lia prizonjako pufiĝis kiel veziko pro la glacia blovo... Sed li, ignorante froston kaj venton, rapidegas renkonte al novaj aventuroj, eble eĉ al sia morto... Aŭ al alia, pli bona vivo.

¹ Monta Ŝorio – montara regiono en Siberio